Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 19-an de marto 2015 per Skype.

(Protokolo aprobita la 9-an de aprilo 2015)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Ulf Lunde en Os, prezidanto de la interkonsiliĝo
Mario Machlik en Tromsø ekde tagord-punkto 3
Amelie Matt en Tromsø

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 20-an de novembro
Aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto raportis pri la ekonomio:
Skagen Vekst kr 50 981,56
Skagen Høyrente kr 126 734,40

3. Jarraporto kaj jarkalkulo 2014
Ankoraŭ mankas la partoj pri mencioj en gazetoj, pri membrostatistiko, pri abonantstatistiko, pri ekonomio kaj la konkludo. Nek la jarkalkulo estas preta. Anne Karin laboros pri tio dum la venontaj semajnoj.

4. Laborplano 2015-2017
En la praktiko ni ne tre uzas la laborplanon pro manko de kapacito plenumi ĉion de ties celoj. Tamen ĝi (kune kun la strategia plano) estas dokumento kiu konstatas kaj priskribas niajn celojn. Eble estus ideo plilongigi ambaŭ dokumentojn sen iu limigo por iu periodo. Nun ni proponos la malnovan laborplanon sen ŝanĝoj ankaŭ por 2015-2017. Oni eventuale povas ŝanĝi ĝin traktante dum la Landa Kongreso.

5. Landa Kongreso
La klubo de Trondheim faros proponon pri la programo laŭ la programo de la pasinta L.K. en Trondheim kaj sendos ĝin al la redaktoro de la membrogazeto.

6. Vortaro
En januaro NEL petis de Uhlen subvencion por financi ankaŭ ĉi-jare la datumbazan laboron pri la vortaro, kiun faras Jørgen G. Bosoni en Trondheim.

7. Eventualaĵoj
A. Venis peto de la klubo de Bergen por ke NEL transprenu la monrimedojn de la klubo ĉar la kasisto ne povas zorgi plu pri tio. La kasisto de NEL transprenos la monon kaj konservos ĝin en aparta loko sub la nomo de la klubo de Bergen.
B. Mario Machlik proponis novan membrosistemon, per kiu oni povus pli facile teni kontakton kun tiuj interesiĝantoj kaj simpatiuloj, kiuj ne regas Esperanton. Tiuj membroj de la nova membrokategorio pagu nur unufojan kotizon kaj ricevu norveglingvan informfoliojn 3-4 foje jare per retpoŝto. Li ankoraŭ plu pensos kaj konkretigos tiun ideon.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 21:30
La venonta interkonsiliĝo okazos la 9-an de aprilo 2015.

Raportis Mario Machlik